

Franz Freiherr von Dingelstedt,

Ĉe la Vezero

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kun mia liuto tie ĉi
Multfoje surmonte mi sidis,
Min mem kaj la mondon forgesis mi,
Dum tiun ĉi valon mi vidis.⁴

Kaj plena estis de hela bril'
Kaj gaja sonor' la aero,
Bruadis malsupre la akvobaril',
Briletis la ond' de l' Vezero.

Flustradis kvazaŭ defore tra l'
Arbaro de l' am melodioj,⁵
Kaj el la aperta grundo de l' val'
Salutis min songaj vizioj.

Kaj plena estis da hela bril'
Kaj gaja sonor' la aero,
Bruadis malsupre la akvobaril',
Briletis la ond' de l' rivero.

Denove mi sidas nun tie ĉi,
La kantojn malnovajn mi penas
Reaŭdi, sed vane aŭskultas mi,
La songoj jam ne plu revenas.⁶

La dolĉaj bildoj forestas jam
Sub morna ĉielo premata!
Adiaŭ, adiaŭ, vi songoj de l' am'!
Adiaŭ, vi tempo beata!

...

⁴aŭ:

Kun mia liuto tie ĉi
Multfoje mi estas sidinta,
Envalen vidante estas mi
La mondon kaj min forgesinta.

⁵aŭ: Arbaro amkant-melodioj,

⁶aŭ: La songoj ne plu revenas.

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de FRANZ FREIHERR VON DINGELSTEDT (*1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1989-06-20.*

MR-228-1 / Arg-424-836 (2012-11-01 16:19:41)

La teksto troveblas ankaŭ sub <http://www.volksliederarchiv.de/text2521.html>. Vidu ankaŭ: http://www.azelschaefermdb.de/files/4/1884-das_weserlied.pdf.